



LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

Eldonata je la nomo de l' Klubo Esperantista en Upsala.

Kosto de abono por jaro: Skandinavaj kronoj 4,00 = germanaj markoj 4,50 = frankoj 5,75 = rubloj 2,00 = portugaliaj rejsoj 1000 = brazilaj rejsoj 2000 = aŭstro-hungaraj kronoj 5,50 = dolaroj 1,25 = ŝilingoj 4 1/2.

Pago por anoncoj: 15 oeroj = 15 pfenigoj = 20 centimoj = 8 kopekoj = 20 heleroj, por duon-paĝa petitolinio. — 10% rabato por duonjaraj, 25% rabato por tutjaraj anoncoj. Ĉe granda anoncado ankoraŭ pli da rabato laŭ reciproka konsento.

Adreso de l' redaktoro: PAUL NYLÉN, UPSALA, Sverige (Svedujo).

Adreso de l' administrado: Presejo de PAUL DE LENGYEL, SZEGZÁRD, Magyarország (Hungarujo).

Kun manuskriptoj kaj ĉio tuŝanta la tekston oni sin turnu al la redaktoro; pri abono, ekspedado, anoncoj kaj ĉiuj monaj aferoj oni devas turni sin al la presejo.

NORDA ESPERANTA SOCIETO.

Ekzistas tre granda nombro da esperantistoj kaj da personoj interesitaj por Esperanto en la nordaj landoj. Malgranda parto el ili kunigis sin fondinte lokajn klubojn, kiel en Upsalo, Stokholmo kaj kelkaj aliaj lokoj. La ceteraj agadas izolate ĉiu en sia hejma regiono. Pro tiu ĉi manko de kunlaborado la rezultato de la propagando estas nur tre malmulta.

La demandoj, kiuj plej ordinare estas adresataj al esperantisto ekparolanta pri Esperanto, estas tiuj ĉi: „Ĉu ekzistas multaj esperantistoj?“ kaj: „Ĉu Esperanto sukcesos en la estonteco?“ El cent personoj, kun kiuj mi parolis pri Esperanto en la intenco de propagando, naŭdek naŭ unue antaŭ ĉio metis la demandon: „Ĉu ekzistas multaj esperantistoj?“

Tio montras la gravan signifon de kuniĝo de la esperantistoj, tiel ke ilia tuta nombro povas esti kalkulata; ĉar granda cifero ofte parolas pli bone ol multaj vortoj.

Por ke afero ia havu sukceson por la estonteco, ĝia utilo kaj neceseco devas esti konfesata.

En tiu ĉi rilato la ĝenerala opinio devas esti influita: la publiko devas lerni kredi la estontecon de Esperanto.

Por prepari la vojon por nia ideo, estas tamen necesa senlaca batalo kontraŭ la indiferenteco, malscio, antaŭjuĝoj kaj moko. Por ke ni povu sukcese batali, estas bezoninde unuigi niajn fortojn kaj uzadi ilin sisteme por disbati unu baron kaj malhelpon post alia.

Gazetaj artikoloj, broŝuretoj kaj informoj devas esti publikigitaj. Paroladoj kaj kursoj devas havi lokon. La scioj kaj la intereso de la apartaj esperantistoj devas esti fortigitaj kaj profundigitaj.

Unuanimeco donas forton, forto nasikas kuraĝon kaj kuraĝo alportas venkon. Tial, ni unuigu nin!

La nordaj landoj havas tiel similajn lingvojn, ke unu estas komprenata en la aliaj landoj. Tial oni povas uzadi suk-

cese komunajn propagandajn verkojn reciproke, kaj, pro tio, kun malpli grandaj kostoj.

Ĝis nun oni sin turnas el ĉiuj lokoj kun demandoj kaj mendoj de verkoj al la Klubo Upsala kaj en la lasta tempo ankaŭ al la Stokholma Klubo. Pro tio la diritaj lokaj kluboj estas tiom okupataj kun ĉia alia laboro, ke preskaŭ neniom da tempo superrestas por la propra disvolviĝo kaj agado de la kluboj mem.

Por bonigi tion ĉi, estas bezonata speciala institucio, kiu zorgu pri la kondukado de l'propaganda laboro mem.

Plu, oni bezonas konstantajn provizojn da lernolibroj, vortaroj kaj propagandaj verkoj; kaj por eldoni kaj ekspedadi tiujn, oni bezonas kapitalon pli grandan, ol povas krei nur negranda klubo loka.

Kiel ajn oni rigardas la aferon, tio ŝajnas klara, ke granda societo estas dezirinda por la speciala koncerno de la nordaj landoj.

Pro tio la subsignita kuraĝis fari la proponon fondi Esperantan Societon, komunan al la nordaj landoj, apogante sin aparte sur la reciproka simileco de iliaj lingvoj naciaj.

Post kiam mi komunikis tiun ĉi mian opinion al diversaj esperantistoj en tiuj ĉi landoj, la propono estis prezentita, kune kun projekto de regularo, en la kunveno de la Klubo Esperantista Upsala la 1-an de marto lasta, kie ĝi estis akceptita kun plena aprobo. La 6-an de marto ĝi estis prezentata al la Klubo Esperantista Stokholma, kie oni tamen montris sin iom pli dubopensema. Post decidita prokrasto, la demando estis parolata denove en la kunveno de la laste dirita klubo la 27-an de aprilo. Tiam la klubo decidis elparoli siajn „simpatiojn por la dezirindeco de la ek-

fondo de tia societo por kunigo de la esperantistoj agantaj en diversaj lokoj de Svedujo, Norvegujo, Finnlando kaj Danujo.“

Mi estas pensanta, ke la regularo de tia Societo estu proksime konforma kun la regularo de la Societo por la propagando de Esperanto en Francujo. Ĉar estas grave, ke ankaŭ tiaj personoj, kiuj ne posedante Esperanton aprobas ĝin, havu lokon en la societo; tial la aranĝo de l' franca societo je tri kategorioj (aprobantoj, adeptoj, propagandantoj) estas tre akceptinda kaj oportuna. Tamen apartaj regularoj pri la rilato de lokaj kluboj en la societo fondota devos esti difinitaj en la regularo.

Ĉiuj, kiuj sin interesas por la projektata societo kaj havas ian proponon aŭ deziron rilate al ĝia fondado kaj ĝia estonta regularo, volu kompleze turni sin per korespondo al la iniciatoro de la projekto.

Paul Nylén.

KRONIKO.

N° 129. Adresaro de la Esperantistoj. Serio XX. D-ro Zamenhof dissendis en la komenco de majo la novan serion de la „Adresaro“. La nombro de la novaj esperantistoj, kiuj dum la jaro pasinta ensendis siajn nomojn kaj adresojn al li, estas 364. La plejmulto estas rusoj kaj francoj; krom ili estas reprezentitaj la landoj kaj nacioj belga, bulgara, aŭstra (bosna, galica, morava), hungara, itala, rumana, svisa, hispana, holanda, sveda, grandbritana, finnlanda, nord-amerika (de Unuigitaj Ŝtatoj), sud-amerika (ĉila, brazila) kaj tunisa (en Afriko).

Por doni al la nove aliĝantaj esperantistoj la eblon komenci *tuj* korespon-

dadon kun la malnovaj esperantistoj, d-ro Zamenhof faras de nun la sekvantan aranĝon en la ordo de enskribo de la novaj esperantistoj:

Komencante de la serio XXI, la numeroj de la novaj esperantistoj estos kalkulataj ne laŭ la alfabeto ordo de la urboj, sed laŭ la ordo de venado de la enskriboj (la alfabeto ordo de la urboj estos presata aparte, kiel ĝis nun estis presata la alfabeto ordo de la nomoj). Ĉiu nove aliĝinta esperantisto ricevos numeron tuj kiam d-ro Zamenhof ricevas lian enskribon, kaj li estos sciigita pri sia numero per la letero, kiu estas presita sur la kvara paĝo de tiu ĉi Adresaro. Kune kun la dirita sciigo li ricevos (senpage) la laste elirintan serion de la Adresaro; sed por tio li jam ne ricevos senpage tiun serion, en kiu estas presita lia adreso (se li dezirus ricevi ankaŭ tiun ĉi serion, li devos ĝin aĉeti aparte, kiam ĝi estos elirinta).

*

Ilustrita Esperanta poŝtkarto. S-ro G. Oreškoff kune kun s-ro H. Popov presigis poŝtkartojn Esperantajn. La adresa paĝo estas tute simila al la ordinara bulgaraj poŝtkartoj universalaj, la alia paĝo estas tre bona portreto de l' aŭtoro de Esperanto. Super la portreto staras la vortoj „Lingvo Internacia Esperanto“ kaj sub ĝi: „D-ro L. Zamenhof. — Unu homaro — unu lingvo. — Progreso estas vivo. Restado estas morto.“ — Nur la loko por la skribo estas tre malmulta.

*

Mortintaj esperantistoj. Per „L' Espérantiste“ ni eksciis, ke du esperantistoj mortis. — S-ro Henri-Étienne Sibourg, membro de la Societo por la propagando de Esperanto, mortis en Cannes (Francujo)

la 6-an de marto 1900, en sia 44-a jaro. Li estis bona esperantisto, sukcesa propagandanto kaj simpatia homo. — S-ro V. A. Pelâs, unu el la membroj rusaj laste aliĝintaj de la dirita societo kaj leganto de nia gazeto, mortis en S. Peterburgo.

*

Kunvenoj dum la Ekspozicio. La esperantistoj, kiuj intencas veni Parizon dum la Ekspozicio Universala, estas petataj skribi plej baldaŭ kiel eble al la Sekretario de la S. p. p. Esp., s-ro René Lemaire en Epernay (Marne), Francujo), por konigi al li proksimume la daton kaj la longecon de ilia restado en Parizo.

Tiu ĉi avizo estas donita por ke la Komitato de la S. p. p. Esp. sciu, en kiaj epokoj estos preferinde aranĝi kelkajn kunvenojn de Esperantistoj en Parizo dum la Ekspozicio. Tiu ĉi avizo estas adresata al ĉiuj, societanoj aŭ ne, francaj aŭ fremdaj. Kompreneble la Komitato petas nenian devigan promeson. Ĝi nur volas koni la proksimuman nombron de tiuj, kiuj serioze intencas veni Parizon en tiu ĉi jaro, kaj la epokojn, kiuj estos plej oportunaj por sin renkonti unu la alian kaj konatiĝi.

*

Bibliografio. *Commentaire sur la grammaire Esperanto*, eldonita de L. de Beaufront kun la helpo de la S. p. p. Esp. — Prezo 2 fr.; kun poŝta transporto: 2,25 fr. — Ricevebla ĉe la Sekretario de la Societo.

Ni ne povas tro rekomendi tiun verkon al ĉiuj, kiuj komprenas la francan lingvon. Ĝi estas tre ŝatinda kaj necesa plenigo de la lernolibro.

Nia lingvo estas la plej facile lernebla el ĉiuj lingvoj, sed oni ne forgesu,

ke ankaŭ ĝi tamen devas esti ellernata serioze; kaj la perfekta konado de Esperanto devas esti la honoro, kiun penu atingi ĉiu esperantisto.

*

Vojaĝoj de esperantistoj. Sub la rubriko „De Rusujo en Francujon“, s-ro René Lemaire priskribas en „L'Espérantiste“ la vojaĝon de s-ro F. Postnikov kaj lian viziton en Epernay en la fino de l' jaro pasinta.

Ni citas pri tio ĉi la sekvantajn vortojn de s-ro Lemaire: „Ni povas nun atesti ke, ne dum kelkaj momentoj kaj per kelkaj frazoj sensignifaj, sed efektive dum pli ol dekdu horoj, sur la strato, ĉe la tablo, en la salono, en nia esploro de la vidindaĵoj — nemultaj — de Epernay, pri la plej diversaj objektoj, s-ro Postnikov, s-ro de Beaufront kaj mi parolis Esperante senĉese, absolute facile, eĉ rapide. Ni triumfis, mi konfesas; ĉar la atestantoj ne mankis: parencoj, amikoj estis tie, renkontis nin, kaj povis konstati, ke ili estas kapablaj nur . . . *silenti*, ne povante komprenigi sin, dum ni kontraŭe, ne sciante, kiel ili, unu vorton de la lingvo rusa, sed sole per la helpo de Esperanto, ni povis interŝanĝi ĉiujn niajn ideojn, ĉiujn niajn pensojn, — kaj eĉ kelkajn nemalicaĵajn ŝercojn pri la aŭdantoj mutaj kaj miregigitaj de nia interparolado. Ni povas do atesti, nun farinte mem la provon pri la Esperanto parolata, ke tiu provo estis longa, perfekta, absolute decidiga, kaj ke ĝi ne sole ne alportis la plej malgrandan dubon aŭ la plej malgrandan eltrompiĝon, sed kontraŭe plenumis kaj eĉ superis ĉion kion ni povis esperi!“

S-ro Postnikov estas transloĝiginta en Azion, kaj lia adreso estas: s-ro F. Postnikov, inĝeniero en *Vladivostok* (Rusujo).

*

El Francujo. „L'Espérantiste“ sciigas en ĉiu numero multajn grandegajn venkojn por nia lingvo; se ni ilin ĉiujn priskribus detale, tio okupus tro vastan spacon de nia gazeto.

— En Dijon (Dijôn'), la 10-an de januaro, s-ro Ch. Lambert, Komisiato por paroladoj en la Fakultato Literatura de tiu urbo, faris paroladon pri *La lingvoj internaciaj*. Cento da personoj ĉeestis, malgraŭ la malbona vetero, kiu certe malutilis iom al la sukceso de tiu kunveno. Malgraŭ tio la rezultato estis tre bona. La Societo de la amikoj de l' Universitato Dijon'a, sub kies aŭspicoj la parolado estis farita, presigis ĝin tute en sia bulteno.

La parolado de s-ro Lambert estis la komenco de grava propagando, kies tre agema kondukanto estas s-ro Charles Méray, profesoro de matematikoj ĉe la Fakultato Scienca, korespondanto de l' Akademiaro Franca. Kvankam li ne estas plujuna, s-ro Méray sukcesis post tri semajnoj posedi Esperanton same kiel se li estus skribinta ĝin dum unu jaro. Li prezentis Esperanton al l' Akademio Dijon'a. — La 28-an de marto s-roj Méray kaj Lambert faris antaŭ multa kaj bela aŭdantaro, kiu kunvenis en la Borso Komerca en Dijon, paroladon sub la aŭspicoj de l' tiea Ĉambro Komerca, kies sukceso estis eksterordinare grandega. La gazetoj „Progrès de la Côte-d'Or“ kaj „Petit Bourguignon“ anoncis la paroladon kaj favore raportis pri ĝi; — „Bien Public“ kaj „Nouvelle Bour-

gogne“ per serioj da artikoloj subtenis tre varme la propagandan agadon.

— En Valence (Valâns') s-ro Lapeyre, instruisto, profitis la aŭdantaron, kiun li havas per siaj vesperaj kursoj, por konigi Esperanton al la junuloj kiuj ilin sekvas.

— En La Rochelle (La Roŝel') s-ro Meyer faris, en la Lernejo normala instruista de Lagord, paroladeton antaŭ kvardeko da junuloj.

La gazeto „Courrier de La Rochelle“ enhavis ofte artikolojn pri Esperanto.

— La nova stenografia gazeto „Sténographe Populaire“, eldonata en Ixelles-Bruxelles, kiel ankaŭ la „Plume Sténographique“, nia malnova amiko, anoncas konstante pri „Lingvo Internacia“ kaj „L'Espérantiste“.

El Svedujo.

La Klubo Esperantista Stokholma. En la n-ro 195 de „Stockholms Dagblad“ ni ĉerpas la raporton pri la lasta kunveno:

„La Klubo Esperantista Stokholma havis hieraŭ vespere (27/IV) kunvenon en la domo de la Kristana Societo de Junaj Viroj ĉe la strato Birjer Jarlsgatan, sub la prezido de fil. lic. E. Etzel. — En la kunveno, interalie, estis priparolata la demando pri la fondado de komuna skandinava aŭ norda esperantista ligo, kaj la Klubo decidis elparoli siajn simpatiojn por la dezirindeco de la ekfondo de tia societo estonta kunigo de la agantaj en diversaj lokoj esperantistoj en Svedujo, Norvegujo, Finnlando kaj Danujo. Post kiam oni traktis la demandon pri tiuj aranĝoj, kiujn povos fari la klubo por veni en komunikigon kun la societoj kaj komitatoj, kiuj en Parizo dum la tutmonda Eks-

pozicio intencas agadi por la utilo kaj servo de la vizitantoj la Ekspozicion esperantolingve parolantaj; la sekretario donis raporton koncerne la farojn, kiuj estis faritaj disvastigi la lingvon en la ordeno da goodtemplanoj en Svedujo. En kunligo kun tio ĉi la riksdagsman (deputato) Styrländer, kiu alestis ĉe la kunveno, sciigis pri tio, kio per lia iniciativo estis farita por vekti kaj fortigi la intereson por Esperanto en la ordeno de goodtemplanoj, kaj elparolis sian esperon, ke en la internacia kongreso de la ordenanoj, kiu kolektiĝos en Stokholmo en la jaro 1902, Esperanto estos akceptita kiel la oficiala lingvo.* — En la kunveno oni ankaŭ sciigis pri la „Esperanta vespero“, kiun aranĝis por la sekvinta jaŭdo la Societo por internaciaj studioj. La kunvenon alestis pli ol 40 personoj.“

La legantoj povas imagi al si la impresojn de l' redaktoro, kiam li sidis tie en la granda, luksa salono, lumigita per elektraj lampoj, kaj vidis ĉirkaŭ si tiun elektitan kolektiĝon da stokholmaj esperantistoj. Malrapide sed certe nia afero progresas. Se oni pensas pri la malgranda komenco kaj la mallonga daŭro de la stokholma klubo, oni efektive ne kuraĝas elparoli la vorton „malrapide“, ĉar se ĝi kreskos konstante laŭ tiu sama proporcio kiel ĝis nun, ni baldaŭ kalkulos centojn, eĉ milojn da partoprenantoj en ĝiaj kunvenoj. Dezirinte bonvenon al la kunvenintaro, precipe al la ordenestro de la svedaj goodtemplanoj, deputato en la Riksdag s-ro V. Styrländer, al la prezidanto de la Stokholma sekcio de l' Societo por internacia ellernado s-rino F. Pettersson, al la fondinto de la Klubo Esperantista Stokholma s-ro V. Langlet kaj al la re-

*) Ĝis nun la angla havis tiun ĉi rolon.

prezentanto de la Klubo Esperantista Upsala, la modesta redaktoro de tiu ĉi gazeto, la prezidanto fermis la interesan kunvenon, kiu daŭris de l' duonhoro antaŭ la 9-a ĝis la 11-a horo. Granda nombro el la alestantoj estis virinoj.

Ne sole en „Stockholms Dagblad“ oni legis artikoletojn pri tiu ĉi kunveno, sed ankaŭ en aliaj stokholmaj gazetoj, ekzemple: „Svenska Dagbladet“, „Nya Dagligt Allehanda“ kaj „Vårt Land“.

*

— *Esperanta vespero ĉe la Societo por Internacia Lernado.* En la supre nomitaj gazetoj ni legis ankaŭ la 4-an de majo artikolojn kun la sekvanta enhavo:

„*Esperanta vespero*, kun multnombro da partoprenantoj, estis aranĝita hieraŭ de la Stokholma sekcio de l' Societo por Internacia Lernado kaj havis lokon en la Lernejo de mastrumado ĉe strato Trädgårdsgatan. La vesperon enkondukis per parolado en Esperanto la prezidanto s-rino Fanny Pettersson. D-ro S. Krikortz poste paroladis pri internaciaj lingvoj entute kaj aparte pri la elpenaĵo de d-ro Zamenhof: Esperanto. Ĥoro aŭdigis kantojn, inter ili unu en Esperanto, kaj direktoro Sellin kaj juĝisto Vestman rusajn kantojn, kaj s-rino Pettersson unu Esperantan kanton „L' Espero“. Ambaŭ kantojn Esperantajn verkis, tiel tekston kiel muzikon, majoro Cl. Adelsköld, membro de la Reĝa Sveda Scienca Akademio. Kandidato V. Langlet en Esperanto paroladis pri siaj vojaĝoj en Rusujo kaj Azio; kaj redaktoro A. Roswall raportis pri la disvastiĝo de Esperanto en diversaj landoj, pri la organizo de la Societoj kaj Klubo fonditaj pri tiu ĉi lingvo, kaj pri la gazetoj esperantistaj. La plej grandan nombron de aliĝoj ĝi

akiris en Rusujo, precipe en S. Peterburgo kaj Odeso, kaj proksime al tiu ĉi lando venas Francujo kaj Hungarujo. La plej gravaj gazetoj esperantistaj estas eldonataj en Upsala—Szegzárd kaj Parizo. En kelkaj grandaj gazetoj oni rezervis lokon al artikoloj en Esperanto. — Artea programo, aranĝita de artistino fr-ino Elsa Hammar, estis metita super la tribuno. Post la fino de kunvenaj aferoj sekvis komuna vespermanĝo kun teo, kaj oni disiris post ĉiel agrabla vespero.“

Tiu ĉi kunveno Esperanta estis granda sukceso por nia lingvo. S-ro Langlet parolis tute fluante, klare kaj simpatie, kaj oni vidis klare, ke la aŭskultantoj, kiuj estis tre multaj, akompanis la paroladon kun intereso kaj komprenante.

*

— „*Reformatorn*“, gazeto por la goodtemplanoj de Svedujo, enpresis en sia n-ro 18 (3/v) grandan artikolon pri Esperanto. Tiu ĉi artikolo, kies aŭtoro estas la fervora apostolo de nia ideo s-ro P. Ahlberg, sekretario de l' Klubo Esperantista Stokholma, estas sendube unu el la plej bone skribitaj en sveda lingvo, kiun ni iam legis pri Esperanto.

En la fino de sia artikolo s-ro Ahlberg skribas la sekvantan:

„Malgraŭ antaŭjuĝoj, indiferenteco, senkaŝita dispremado ke, ne malpleje, financaj malfacilaĵoj, la Esperanta movado, sekve, dum sia dekdujara ekzistado tamen senĉese kreskis, pligrandiĝis kaj fortigadis sen subteno, sen helpo, tiel diri sub batoj kaj puŝoj, kaj trovas sin nun en situacio kun la plej bonaj elvidoj por la estonteco. Ĉu tio ĉi ne montras eksterordinaran vivopovon, kiu ne estus ebla, se la Esperanta afero ne portus en si mem

la fortecon de la vero? Ĝia malrapida, sed konstanta disvolvigo en malriĉeco pravas pli ol la plej rapidegaj sukcesoj, kiuj estus gajnitaj per la eksteraj helpiloj de l' kapitalo kaj la bruanta reklamo. Tamen, se oni komparas la akiritajn rezultatojn kun la malfacilaĵoj de l' entrepreno, oni devas konfesi, ke la sukcesoj de la Esperanta movado estis kaj grandaj kaj rapidaj.

Post du jaroj kunvenos en nian ĉefurbon reprezentantoj por la internacia sobriga movado el ĉiuj regionoj de l' tero. Ili ne venos tien ĉi nur por „rigardeti la urbon“, ankaŭ ne sole por ekvidi unu la alian, sed ili alvenos por interŝanĝi pensojn, por komunikiĝi pri kunlaborado en sia grandega, mondampleksa agado, por kunligi pli fortike la ligojn de amikeco, kiujn ŝpinis la komunaj penadoj por unu sama idealo... imagu al ni, ke ĉiuj tiuj homoj povus plene kompreni unu la alian, interparoli inter si kiel kun siaj samlandanoj...!

Nova tempo rompas al si vojon en pli kaj pli decida maniero, kaj la postuloj pri pli facilaj kaj konvenaj, alireblaj por ĉiuj, spiritaĵoj komunikiloj estas ĉie pli klare elmontrataj kun forto kreskanta. La grandaj spacegoj, en lingva rilato, kiujn povis ĝis nun suriri nur la malmulta nombro da dimanĉenaskitoj de la instruitularo favoritaj de l' feliĉo, fariĝis dank' al la lingvo Esperanto alireblaj por ĉiu homo donacita je sana saĝo kaj ordinara popolerneja sciado, kaj per tio la ebloj de sciado kaj memklerigo pligrandiĝis por la tuta granda amaso da homoj, kiuj ne havas la tempon nek la monon por kostigi al si longan kaj monkaran instruadon je fremdaj lingvoj.

Esperanto signifas la finon de la spirita disbariteco inter la popoloj. Esperanto

signalas ne unu novan paĝon, ne unu novan folion, sed la komencan de unu nova ĉapitraro en la kulturhistorio de l' homaro.“

La artikolo enhavas ĉion notindan pri Esperanto kaj la Esperanta propagando k. t. p. en Svedujo kaj aliaj landoj: pri la celo kaj konstruo de Esperanto, pri kluboj kaj societoj, informoj pri la gazetoj „Lingvo Internacia“ kaj „L'Espérantiste“, pri la literaturo Esperanta kaj la pli rimarkindaj okazoj en la historio de la propagando.

Sub la artikolo la redakcio mem de la „Reformatorn“ per kelkaj vortoj varme rekomendas nian lingvon al la sobrigularo. Ni devas memori, ke la „Reformatorn“ havas 10,000 legantojn, el kiuj la plejmulto estas tre kleraj kaj vigleminaj laboristoj kaj metiistoj en la urboj kaj la lando.

En tiu ĉi numero de „Reformatorn“ estas ankaŭ anoneo pri la lerniloj Esperantaj por svedoj.

*

— En la gazeto „Socialdemokraten“, eldonata en Stokholmo, estis presita la sekvanta noteto: „Homo, kiu kredas la estontecon de la lingvo Esperanto, estas la goodtemplanestro V. Styrlander. Li diras en „Reformatorn“, ke, laŭ lia opinio, estas nur tempa demando: kiam tiu lingvo fariĝos efektiva internacia parola kaj skriba lingvo.“

*

— S-ro J. J. Süssmuth en Södertelje enpresigis anoncojn en la gazetojn „Södertelje-Tidningen“ kaj „Stockholms-Tidningen“, ke li vendas Esperantajn lernolibrojn kaj donas informojn pri la lingvo.

*

El Hungarujo.

Esperanto kaj la hungaraj gazetoj. Multaj diversaj hungaraj gazetoj okupis sin en la lasta tempo pri Esperanto, ĵus el la kaŭzo de la translokigo de „Lingvo Internacia“ en Hungarujon, per kio nia afero ekaperis antaŭ iliaj okuloj, tiel diri, en korpiginta konkreta formo. Post ke N° 1 de nia gazeto elvenis, en la hungara gazetaro aperis multaj artikoloj, kiuj havis tion reciproke komunan, ke ili ĉiuj parolis kun simpatio kaj bonhumoro pri Esperanto kaj L. I.

Estas nature, ke en tia fabela lando, kia estas Hungarujo, multaj faktoj estas troigataj kaj eksotika brilo da miro kaj grandegeco estas sternata super la esperantistaj aferoj; tio efikas ja iom fremdmaniere kaj strange al la seriozaj homoj, kutimigitaj je la pedanta matematika vero sen la kovraĵo de la luksa purpura mantelo de fantazio. Sekve, laŭ la imago de la hungaraj redaktoroj la apostoloj de Esperanto estus ne malpli ol universitataj profesoroj kaj eksterordinare grandaj filozofoj.

Ĉar ni pensas, ke tiuj ĉi artikoloj interesas tre niajn legantojn, ni tradukas ekzemple unu el „Pesti Napló“ N° 119 (1. V.) kaj „Magyar Állam“ N° 101—12329 (4. V.) politikaj ĉiutagaj gazetoj en Budapeŝto:

„*La mondeminenta Szegzárd.* La mal-kontentaj patriotoj, kiuj malŝatas la rolon de Hungarujo en la internacia vivo, certe legas kun granda plezuro, ke postnune Hunnia*) estos iamaniere la mezo de l' tuta mondo. Ne tiamaniere, ke eble la Roma papo transportas sian sepcentcamban Vatikanon en la fortikaĵon de Buda, sed alie, vere surprizmaniere: la antaŭ-

*) Antikva nomo de la nuna Hungarlando.

mateno de la nova epoko disradiiĝos el unu modesta urbeto provinca al la mondo civilizita. Tiu ĉi modesta urbeto provinca estas Szegzárd, la malgranda, vinberujplena Szegzárd, kies nomon tiel ofte prenadas sur lipojn la bonhumora homaro dum gajaj vinamuzadoj. La afero estas kunligata kun la lingvo Esperanto, kun tiu ĉi senzacia elpensitaĵo de la modernaj cerboj. La lingvo Esperanto estas leĝa posteulo de la lingvo volapük, t. e. tiu idiomo, per kiu la eskimoo nordpola povas senĝene babiladi kun la negro kongoa, kaj per kiu la malafabla montenegro sen malfacileco povas interŝanĝi siajn pensojn kun la arabo sahara. La apostoloj de la lingvo Esperanto havas organon, kies titolo estas: Lingvo Internacia. Tiu ĉi gazeto ĝis nun aperis en Svedujo, sed nun, per unu salto kuraĝega, ĝi forlasis la malvarman Nordon, por ke ĝi transmigrigu en apudo de riverego Danubo al pli bela klimato. La gazeto esperanta ne aperos plu en Stockholm, sed en — Szegzárd. Oni jam dissendis la koncernan alvokon je abono; la gazeto aperas unu fojon en ĉiu monato kaj ĝia abonpago estas 5 1/2 kronoj por jaro. Ĝia eldonanto estas Paul Lengyel, al kiu ni deziras el nia pura koro, ke Dio lasu lin vivi tiel longe, ĝis kiam liaj ideoj ĉie venos je triumfo.“

*

— „Tolnamegyei Közlöny“, semajna gazeto en Szegzárd, n-ro 17 (26. IV.), parolas, en tre informanta artikolo, ne sole pri „Lingvo Internacia“, sed ankaŭ pri „L' Espérantiste“.

*

— En n-ro 17 (29. IV.) de „Tolnávármegye“, semajna politika gazeto en Szegzárd, sin trovis tiu ĉi mokeŝercanta liniaro, kies verkinto estas la ĉefa kun-

laboranto de la „T—e“ mem: „Szegzárd jam iom perdis sian mondeminentecon ĝuitan pro sia vino, dum la filoksero elmordetis la bonan kadarka-vinberujaron, kiu produktadis la mondeminentan ruĝan vinon. Sed nia urbo nun reakiris la mondeminentecon, ĉar de nun tie ĉi aperadas la sola (1) gazeto de l' plej nova mondlingvo Esperanto, en eldono kaj presado de Paul Hugo Lengyel szegzárdá loĝanto. La titolo de l' gazeto estas Lingvo Internacia, ĝis nun ĝin redaktis en Svedujo unu tiea *universitata profesoro*, *) unu fervora apostolo de la lingvo Esperanto, kaj ĝi vivas jam la 5-an jaron. Por ke ĝi gajnu pli grandan disvastigon, pro instigo de la sveda scienculo nun P. L—l eldonas la interesan gazeton tie ĉi en Szegzárd, kaj li petas la sininteresantojn, ke ili abonu ĉe li la gazeton literaturan skribitan en la lingvo Esperanto tre facile lernebla. Ni alvokas la atenton de tiuj, kiuj amas la kuriozojn literaturajn, je tiu ĉi interesa entrepreno. La gazeto aperas ĉiumonate en amplekso da 16 paĝoj, kaj ĝia abonpago estas 5 fr. 75 c. aŭ en hungara mono 5 kronoj 50 heleroj. Tiel la „L. I.“, kiel „L' Espérantiste“ aperanta en Francujo havas abonantojn en ĉiuj landoj de l' mondo. La redaktoro de l' gazeto (Lingvo Internacia) varme rekomendas la facile lerneblan lingvon; kiuj sin interesas pri ĝi, ili ricevas klarigon de Paul Lengyel. — Precipe ni rekomendas ĝin al fraŭlinoj dezirantaj edziniĝi, ĉar ili povos en tiu ĉi

*) Ni devas konstati, ke la profesio de l' redaktoro estas iom pli modesta; samtempe ni povas tamen rimarkigi, ke ni havis la honoron enpresiti en L. I. artikolojn de du upsalaj universitataj profesoroj, el kiuj unu elparolis tre simpatian opinionon pri Esperanto, nome la distinginda fonetikisto d-ro J. A. Lundell.

Rimarko de l' redaktoro.

lingvo korespondadi kun la junaj kaj maljunaj viroj-esperantistoj de l' tuta mondo, kaj ili tiamaniere eble ektrovos la idealulon, pri kiu ili sopiras kun varmefrapanta koro.“

La tutan seriozan parton de tio ĉi (senŝerce kaj senmoke) reprenis la budapesta politika ĉiutaga gazeto „Budapesti Napló“ (1. V.) N^o 119.

*

— „Pécsi Figyelő“ N^o 100 (2. V.) ĉiutaga politika gazeto en Pécs*), diras interalie: „Esperanto-lingva gazeto en Tolna distrikto. Kredinde la szegzárdá presisto P. Lengyel estas unu el la plej entreprenemaj presistoj, — alie li ne estus entrepreninta la eldonadon de la „Lingvo Internacia“, la monata gazeto de l' esperantistaro.“ — La artikolo finiĝas per la sekvantaj vortoj: „Ni ne kredas, ke tiu ĉi gazeto de esperantistoj ricevos ĉe ni 100,000 abonojn.“ —

... Oni vidas laŭ tiuj ĉi ekzemploj, ke la hungara ĵurnalistaro donas sufiĉe grandan atenton al nia afero.

*

El Aŭstrujo. En „Obersteirische Volkszeitung“, n-ro 34 (28. IV.), eldonata en urbo Leoben en Steiermark (Stirujo), estas enpresita granda artikolo, subsignita de „R. Sp.“ kun la titolo: „Der internationale Weltverkehr in sprachlicher Beziehung“ (la internacia tutmonda interkomunikiĝo en lingva rilato). La celo de la artikolo estas vekti la interesecon de la legantoj por la internacia ko-

*) Urbo Pécs estas ĉefurbo de la najbara politika distrikto Baranya, — Szegzárd estas ĉefurbo de la politika distrikto Tolna.

respondado precipe en lingvo internacia. La plej interesa por ni estas tio, ke la verkinto konstante parolas en la d u n o m b r o pri lingvo internacia: li parolas ankaŭ pri volapük kiel nuntempa lingvo internacia. El tio ĉi ni povas kompreni, ke inter la montegoj de Stirujo ankoraŭ vivas kelkaj ekzempleroj forgesitaj el la „malofta birdo“, kiun la historio nomis „volapükistoj“. Antaŭ kelkaj jaroj oni sendis al ni el Aŭstralio gazeton: la unuaj numeroj estis skribitaj sole en la dirita lingvo, sed iom post iom la angla traduko, enkondukitita en la sekvintaj numeroj, tute tiranis la originalan idiomon, tiel ke tiu ĉi lasta plene malaperis kaj la gazeto mem mortis. Vidante la dualismon en la suprenomita stira gazeto, ni dum unu momento sentis la tenton fari el „Aŭstralio“ malbonan vortludon pri „Aŭstr—alio“, sed ni tamen rifuziĝis.

Ni esperas, ke la verkinto de l' dirita artikolo, kies intenco estas bona kaj kies verko estas leginda kaj informanta, ne malkomprenos nian ŝercon. Kvankam ni ne pensas, ke estas absolute danĝere, se iu rekomendas ankoraŭ la volapükon, — ni tamen opinias, ke tia rekomendo estas neoportuna kaj tute mallogika.

*

El Italujo. S-rino Rosa Junck propagandas nian lingvon per artikoloj kaj anoncoj en la gazetoj „Arpa Grafica“, „Corriere Ligure“ kaj „Journal de Bordighera“. — Ankaŭ „La Martinella“, organo socialista toscano, enhavis bonan artikolon sufiĉe longan pri Esperanto. — S-ro Pietro Gibelli, libristo kaj gazetisto faras en sia gazeto „Cronaca Ligure“ propagandon konstantan por Esperanto. Ankaŭ „The Swiss and Nice Times“ favore parolis pri

nia afero. — En Parmo, s-ro Lamberto Rossi faris en la Klubo Filologia paroladon por konigi nian lingvon internacian. Pri tio la gazetoj „Per l' Arte“ kaj „Gazzetta di Parma“ enhavis raportojn tre laŭdajn.



VESPERO.

(De l' sveda poeto K. A. Nikander.)

Salutas mi vin, ĉarmoriĉa,
Pacema, trankvila vesper'!
Min faras vi tiel feliĉa,
Ne pensu mi nun je l' mizer'.

Jen, kiel anĝel' orflugila
Al ter' malleviĝas nun vi,
Kaj ĉio fariĝas trankvila,
Ripozon vi donas al ni.

Paciĝon donante vi sidas
Jen inter la nokto kaj tag';
Ĉielon kun ter' oni vidas
Kuniĝi sur l' akvo de l' lag'.

La suproj de l' mont' kaj la kronoj
Arbaraj briletas en or',
Freŝiĝas la floraj burĝonoj
Per dolĉa de l' roso la plor'.

Kaj Dion en ĝojo nun laŭdas
De l' birdoj libera la ar',
La „Ave Maria'n“ mi aŭdas
Eksoni en tuta l' arbar'.

Ne plendu, ke nigran nun tiras
Vualon la nokt' super ter',
Ke suno la bela foriras, —
Revenos ĝi kiel l' esper'!

Foriras ĝi en la purpuro
De l' nuboj en la okcident',
Sed baldaŭ kun nova poluro
Revenos ĝi en l' orient'.

Al mia dometo malriĉa
Nun venu, ho bela vesper'!
Min faras vi tiel feliĉa,
Ne pensu mi nun je l' mizer'.

Tradukis

Sig. Agrell.



La deveno de l' montoj.

(Litova legendo.)

Kiu nescias, ke ĉio devenas kaj elvolviĝas el semo? Tial en la komenco estis ankaŭ la semo de l' mondo. — Dio (Dievas) dividis tiun ĉi semon je du partoj: el la unua Li kreis la ĉielon, el la dua Li ekdecidis elkonduki la teron. Laŭ la Dia volo la grandega proceso de l' tera disvolviĝo iris rapide antaŭen. Aperis la herbejoj ornamitaj per belaj multkoloraj floroj, montriĝis la arbaroj kun sia birda kaj besta loĝantaro, pleniĝis la maroj per milspecaj fiŝoj kaj ekbruis per siaj ondoj.

De la dua duono da monda semo restis nur malgranda parteto. Sendube Dio ankaŭ el tiu ĉi lasta peceto estus kreinta ion bonan. Sed Diablo (velnias), kiu kun envio rigardadis la Dian laboradon, ekintencis difekti la Dian faron, por ke la mondo ne estu tro bona. Tial li lerte forŝtelis la restintan parteton de l' monda semo, kaj por ke Dio ne rimarku la ŝtelaĵon, enmetis ĝin en sian buŝon. — Sed vi rigardu, kio okazis. La forŝtelita parteto,

malsekiĝinta per la diabla kraĉaĵo, ekkomencis en la buŝo tuj rapidege grandiĝadi kaj ŝiradi la makzelojn de l' diablo. Tiu ĉi, ne povante sin teni pro doloro, kvazaŭ furiozulo ĉirkaŭkuris la tutan teron, mordante per la dentoj la kreskantan en la buŝo mondan semon kaj elkraĉante ĝin parteton post parteto. Kaj kie ajn li elkraĉis peceton de l' monda semo, tie tuj elkreskis alta monto. Tiel la tero estis difektita per disĵetitaj sen ordo montaj amasegoj, kiuj per sia senforma ekstero klare montras, ke ili ne estas Dia kreitaĵo.

Kovno, Rusujo.

P. A. Dombrovski.



„La knaboj.“

La horloĝo de la turo de l' urba preĝejo montris la duonhoron antaŭ la deka. Sed estis silento sur la ludoplaco sub la maljunaj ulmoj ĉe la spaco ĉirkaŭ la preĝejo, ĉar la altlernejo jam finis sian printempan semestron. La grizhara domservisto de la lernejo staris sur la perono al la strato lumobanante sin apud la kalkoblanka muro. Li ĝuis la printempan aeron kaj sunvarmon kaj rigardis la herberojn, kiuj eliĝis inter la stratoŝtonoj apud la angulo de l' perono. Tamen li elvidis enua; sendube li sentis la mankon de l' junula bruaro, je kiu li kutimis en tiu ĉi horo de l' tago. Duone en sunlumo, duone en ombro de l' strato kuŝis senhoma laŭ tuta sia longo; oni vidis tie nur knabon, kiu staris enrigardante la butikan fenestron de la librovendisto.

Ĝia elmetaĵo konsistis el la verkoj sekvantaj: „Ŝercaj anekdotoj“, prezo 16

ŝilingoj banko *); „La mirinda rakonto pri Birdo Blu“, prezo 4 ŝ. b-ko: „La fiŝisto kaj lia malkontentema edzino“, kun lignogravuro sur la paĝo titola, prezo 2 ŝ. b-ko; „Polikarpo aŭ ĉevaliro Finke“, kun lignogravuro sur la paĝo titola, prezo 2 ŝ. b-ko; „La stranga rakonto pri Karsus kaj Moderus“, prezo 3 ŝ. b-ko; „Tri belaj kantetoj: 1) La delikata paŝtisto Fingal; 2) La filino de komercisto ĉe Hamburga ponto; 3) La knaboj“; prezo 1 ŝ. b-ko.

La rigardanto de tiuj verkoj posedis jam la „Birdo Blu“. La fabelon pri la fiŝisto li konis antaŭe. La anekdotoj estis tro multekostaj por aĉeti. Sed la aliaj... Li traserĉis siajn poŝojn, eltiris unu zumturnludilon kaj unu pilkon kun ledrimenoj, palpis inter pecoj de grifeloj kaj vitrokugloj kaj trovis kelke da kupraj moneroj, kiuj, kunkalkulite, faris proksimume 8 ŝilingojn banko, sekve pli ol sufiĉe por aĉeto de „Karsus kaj Moderus“, „Ĉevaliro Finke“ kaj la tri kantetoj.

Li eniris la butikon kaj elvenis kun gaja animo, certa pri feliĉa horo. Jen prezentis sin la demando trovi oportunan lokon por la legado. Li meditis unu momenton pri iu el la remboatoj, kiuj kuŝas ligite ĉe la lago pontoj; sed li decidis sin por la terolando. Proksime apud la urbo troviĝis kaduka fortikaĵo, tiam eble la plej parada ruino inter la limoj de la svedalando. Aerdetruigantaj bastionoj de rimarkinda alteco, ĉirkaŭitaj de subfalantaj ŝtonegoj. Longadaj kurtinoj**) kun vido-truoj duone kaŝitaj sub polvaĵo kaj mortero, sed tiom pli allogantaj por eltrovaj

*) Malnova sveda monero: 1 ŝilingo = 2 oeroj; 1 ŝilingo banko = 3 oeroj.

Rimarko de l' tradukinto.

**) Kurtino = parto de fortikaĵa remparo.
Rimarko de l' tradukinto.

migradoj en mistera laborinto da arkaĵejoj, kiuj, laŭ tio kion sciis la maljunulinoj kaj knaboj de l' urbo, kondukus en la estejon de la porkino de l' Dio Tor kaj en salonon, en kiu dormas batalistoj blankabarbaj. Antaŭ la kurtinoj estis duonlunformaj redu-toj, kies flankanguloj prezentis en la vintroj krutajn deklivojn oportunajn por glitveturado. Ĉirkaŭ ĉio tio ĉi estis retaĵo da remparoj kaj remparokavoj, dum la printempa semestro estante la ordinaraj arenoj de la militaj bataloj kaj pilkoludoj de la lerneja junularo.

La posedanto de la diritaj literaturaj verkoj direktis sin tien kaj lokis sin en la gorgo inter la reduto, kiu laŭ la knabara lingvo havis la nomon „Alta Monteto“, kaj unu angulo de la bastiono Gustavo Adolfo. Estis benita kreskemeco dum tiu ĉi antaŭsomero. La herbo staris densa kaj alta; kien ajn oni kurigis la rigardon, laŭlonge la etendoj de valoj inter muroj kaj remparoj aŭ supren laŭ la ravelinaj*) deklivoj, oni vidis en la verdaĵo la briletadon de hieracioj kaj ranunkoloj, kampanuloj, lekantoj kaj viskarioj. La tufa torfkovraĵo de la kurtino estis pli densa ol kutime kaj tiel riĉe ornamita per sovaĝaj rozoj, ke brilis la ruĝo de tie ĝis la loko, kie sidis la knabo. Super la balustrado de la bastiono klinis sin tie kaj tie plene disburĝonita saliko.

La lego de „Karsus kaj Moderus“ komencis. La rakonto estis interesege. Karsus estas krimemulo, kiu pripensas malbonon kontraŭ sia honesta frato Moderus. Ĉu liaj malnoblaj planoj estos plenumataj? Enprofundite en tiu ĉi demando la knabo ne observis, ke iu alproksimiĝis per ŝteliĝaj paŝoj.

*) Ravelino = duonlunforma reduto.

Rimarko de l' tradukinto.

„Kanajlo!“ eklaŭtis kolera voĉo.

La knabo eksaltis, turnis sin kaj vidis super sia kapo hispanan kanon kaj antaŭ si altekreskan, maljunan sinjoron kun ora galono sur la ĉirkaŭo de l'ĉapo. La hispanan kanon, la galonon kaj sub la ĉapŝirmilo flavepalan vizaĝon kun koleraĵoj kaj kunmordantaj lipoj, — tion li ekvidis en la surpriza unua momento. Post tio sin malkovris, ke la maljuna sinjoro portis la surtuton butonumita ĝis larĝa, rigida nigra koltuko, el kiu streĉis sin sub la orelojn rigidaj kolumoj, kiuj ŝajnis iel koleremaj eĉ ili. Kaj fine sin malkovris io mokema ĉirkaŭ la buŝo kaj en la okuloj io, kio ludetas.

„Kanajlo, kion vi faras tie ĉi?“

La knabo anstataŭ tuj respondi, levis instinkte unu brakon por ŝirmi la kapon kontraŭ la minacanta ekbato de l'bastono. Poste li elpuŝis la respondon: „nenion.“

„Ĉu vi ne hontas, fripono? Ĉu estas nenio, ke oni kontraŭagas la leĝon kaj publikan ordonon? Ĉu estas nenio, diru, se oni spitas la reprezentanton de l'reĝo? Ĉu vi ne scias, ke estas malpermesite iri tie ĉi kaj dispaŝadi mian herbon, la herbon de l'guberniestro? Ĉu vi ne vizitadas la preĝejon, vi malgranda friponeto? Ĉu vi ne aŭdis la ordonon el la predika tribuno, malbela maliculeto?“

„Ne.“

„Vi mensogas kaj ricevos batadon, duoble da batado, ĉar vi ŝajnigas vin nekona. Vi sciis, ke vi estas sur malpermesita loko. Konfesu, aŭ mi elbatos el vi la mensogon!“

„Mi ĝin ne sciis. Mi aŭskultas nur malofte la publikajn anoncojn.“

Ektiriĝis iom ĉirkaŭ la lipoj de l'guberniestro, sed la hispana kano, kiu jam sin mallevis, estis levita denove. La knabo

faris ree la ŝirmigan ekmovon de l'brako kaj ĉe tio defalis la literaturaj trezoroj. Karsus flirtis al unu flanko, ĉevaliro Finke al la alia, kaj la kantetoj falis al la piedoj de l'guberniestro.

„Kia sensencaĵo estas tio? Alportu!“

La hispana kano estis ree mallevita kaj montris al la presajoj. La knabo, pala pro teruro, alprenis unue la kantetojn, kiuj kuŝis plej proksime, kaj transdonis ilin, poste li ĉirkaŭrigardis pri „Karsus“ kaj „Finke“.

Dumtempe la maljuna sinjoro okulis la kantetojn kun mieno, kvazaŭ ili estus priserĉitaj kriminalaj dokumentoj. Li interfoliis la studion en tiu ĉi maniero:

„Vi iradas la altlernejon, mi rekonas vin. Ĉu la lernejestro permesis al vi legi tian? Ĉu li diris, ke vi devus malzorgi viajn lecionojn pro tia legado? La delikata paŝtisto Fingal! Hontel! Ĉu vi devas zorgi pri la delikataj sentoj de paŝtistoj? Plej neŝatinda poezio de servistinoj, ankaŭ. Komercisto loĝadis ĉe Hamburga pont', Filinon li havis plej belan en mond'. Tio ĉi estas ja sensenca poezio de ŝipistoj. La knaboj' . . . tio ĉi traktas sendube pri friponaĵo kaj . . .“

La guberniestro interrompis subite sian akompanatan de teruraj rigardoj kritikon, kaj ŝajnis preskaŭ ke li estis konfuzita. Li rigardegis silente en la kanteto. La silento daŭris do paron da minutoj. Li ne estis atendinta renkonti tie ĉi tiujn knabojn, kiujn tie ĉi li trovis. Li traokulis la kanteton de ĝia komenco ĝis la fino, kvankam supozeble li konis ĝin parkere.*)

*) „La knaboj“ estas poemo de la glora poetino sveda Anna Maria Lenngren, poemo, kiun ĉiu klera svedo konas tre bone.

Kiam li finis la legon, lia mieno estis ŝanĝita. Ĝi estis serioza, sed ne kolera kaj minacanta.

„Knabo,“ li diris, „vi agis kontraŭ la leĝo kaj publika ordono. Ĉu vi faris tion kun scio kaj volo aŭ ne? Ĉu vi ne sciis, ke tiu ĉi loko estas malpermesita ĝis la rikolto de herbo?“

„Ne.“

„Knabo, diru al mi, ĉu vi uzas mensogi?“

La demandito silentis.

„Respondu!“ diris la guberniestro kun pli laŭta voĉo; „ĉu estas via kutimo mensogi?“

„Ne.“

„Ĉu vi do neniam mensogis?“

„Jes iam.“

„Ĉu multfoje?“

„Certe jes, estas eble multfoje se kalkulite, sed plej ofte mi diras la veron.“

„Legu tion ĉi!“ — Li montris al la paĝo, sur kiu troviĝis la rubriko „La knaboj.“ — Li alprenis denove teruran mienon kaj gatis per la mano sian hispanan kanon laŭlonge al la surpinto: „Poste ni kvitancos la aferon unu kun la alia. Mi ne forlasos vin, antaŭ ol vi ricevis memoreblan punon.“

La knabo komencis ploroprete:

La tempon mi memoras,

La dolĉan de junec' . . .

„Haltu! Ĉu vi pensas, ke oni parolu pri dolĉaj memoroj per tiel plendanta tono? Krom tio vi premas tro multe la rimojn kaj substrekas la vortojn en tute malĝusta maniero. La ĝusta akcentado ne estas malfacile trovebla. Ĝi venas per si mem, se oni legas, kvazaŭ estus oniaj propraj vortoj. Komencu denove.“

La knabo silentis.

„Komencu denove!“

„Mi ne povas legi tiel, kiel vi volas, guberniestro.“

„Kial ne?“

„Mi ne povas, ĉar poste mi ricevos batojn.“

„Poto!*) Esti batotima, sed ne mensogotima! Fi! Vi devas honti. Sed eble vi estas ŝtofo de soldato. Ni vidu do! En gard'! Vidu al mi en la okulojn! Retiru la ŝultrojn! La bruston antaŭen! En gard'! Rektu! Guste tiel . . . kaj nun legu!“

Ekbrilis en la okuloj de l' knabo. Li legis kuraĝe kaj kun penso pri tio kion li legis:

La tempon mi memoras,
La dolĉan de junec':
Amike akompanis
Min pac' kaj senkulpec',
La pek' terura ŝajnis,
Ĉagren' tuj iris for;
Escepte lecionon
Nur estis gaj-labor'.
Sur mia buŝ' rideto
En la anim' plezur',
Ĉe l'sango loĝis sano.
Bonhom' ekzistis nur.
Kaj ĉiu gaja knabo,
Kaj ĉiu bel-knabin'
Tuj estis miaj fratoj,
Kaj maljunin' patrin'.

„Haltu! Tio sufiĉas. La reston vi legu, kiam vi estos sola. Jen al la puno kiun vi ricevos de mi. Vi konfesis, ke iafoje vi mensogas. Kial vi mensogas? Ĉu vi pensas, ke tio estus justa aŭ amuza?“

„Certe ne.“

„Estas do sendube por eviti punon, kiam vi faris ion, kio ne estis justa?“

„Jes.“

*) Anstataŭ „malkuraĝulo“.

„Vi eble neniam pripensis, ke tiu, kiu faras tiel, agas malkuraĝe. Vi sekve estas malkuraĝa knabo.“

„Ne,“ respondis la knabo, ruĝa pro ĉagreno kaj honto, „mi ne estas malkuraĝa. Mi neniam forkuris el batalo inter knaboj. Mi plivole akceptas batojn, ol mi forkurus. Mi ne forkuras pro ia plifortulo.“

„Sed vi estas malkuraĝa antaŭ viaj superreguloj. Sekve tamen tima knabo. Morale tima. Tio estas precize la plej malbona timo. Timaj knaboj ne estas inda porti la nomon svedo. Vi volas sendube tamen esti inda je tiu nomo?“

„Jes.“

„Mia amiko,“ diris la maljuna sinjoro, „mi ne volas esplori, ĉu vi estis prava aŭ ne, kiam vi diris, ke vi ne konis la malpermeson iri tie ĉi sur la remparoj . . .“

„Mi ne konis ĝin.“

„Sed mi volas prezenti al via koro, ke Dio postulas verdiremon, kaj ke via lando bezonas veremajn, kuraĝajn virojn. Ili estas bezonataj en la konsilistaro de l' reĝo, en la regna deputataro, en la vicoj de la militistoj, en la oficistaj institutoj, en la predika tribunoj, en la komerco kaj ĉiutaga laboro kaj ĉe la plugilo. Kio ajn vi fariĝos en la estonteco, la patrujo bezonas vin veraman, sentiman viron. Ne malbonigu la memoron, kiun vi havas de vja knabeco, per la memoro ke vi estis mensogema knabo. Vi estas ja nun en la dolĉa tempo, kiun vi klare rememoros en la tagoj de nejuneco. Ĉiun infanon akompanadas la bonaj spiritoj Senkulpeco kaj Paco. Jen ili alestas“ — la guberniestro montris per la hispana kano, kvazaŭ per siaj korpaj okuloj li vidus ilin en la proksimo, — „gardu, ke ili ne forlasu vin!“

La hispana kano prenis nun alian direkton kaj montris al la bastiono Gus-

tavo Adolfo. „Tie supre ne estas malpermesite paŝadi sur la herbo. Tiu loko estas esceptita el la malpermeso, kaj oni povas amuzi sin tiom bone tie, kiel tie ĉi. Iru tien kaj legu viajn kantetojn kaj mirrakontojn!“

La guberniestro foriris, povas esti ke malkontenta pri sia kolero, se li estis efektive kolera, kaj eble ĝoja metinte ian sermon, kiu povus ĝermi. La knabo iris al la bastiono Gustavo Adolfo kaj daŭrigis la legadon de „Karsus kaj Moderus“.

El la rememoroj de l' infaneco de la glora, nobla sveda verkisto

Viktor Rydberg.

Tradukis P. Nn.



LA UNUA GURDO.

Kristnaska rememoro

de

GUSTAF SCHRÖDER.

„Vi venos ja hejmen al la kristnasko?“ diris mia patrino unu tagon en la fino de l'aŭtuno, kiam mia frato kaj mi, post vizito en la hejmo, disiĝis de ŝi por veturi al nia loĝejo en la plej norda parto de Vermland: Elfdalen.*)

„Jes, se nur ni povos,“ estis nia respondo, „almenaŭ ni tion esperas.“

„Jes, karaj knaboj, faru tiel! Estas tiel maltrankvile pensi ke vi restas tie malproksime en la sovaĝaĵo, inter sovaĝaj homoj dum la festo; venu nepre!“

Ne deziris do nia patrino, niaj gefratoj kaj samaĝaj amikoj de juneco, kiuj nombre kolektiĝis por diri al ni adiaŭ, pli vive, ke ni venu, ol ni mem, ĉar kristnasko

*) Elfdalen signifas „la valo de l'rivero“; elf = rivero, dal = valo, -en = la.

Rimarko de l' tradukinto.

tie en Elfdalen ne povus doni multe da plezuro. Malmulte da najbaroj troviĝas en tiu ĉi malproksima loko, kaj niaj samaĝaj kolegoj, la signigistoj de trabegoj, sendube rapidos ĉiu al siaj familioj. Ni respondis tial kun plej plena intenco: „Ni certe venos!“

Jen proksimiĝis la kristnasko. La frostoj kaj la vetura neĝo venis malfrue en tiu jaro. Fariĝis moviĝo kaj laborado en la arbaroj de ligno. Ĉiu penadis elveturigi kiel eble plej multe da trabegoj, por perlabori kiel eble plej multe da mono. Ne tiom pro tio, ke la kristnasko venas, ĉar en nia paroĥo, Dalby, oni ne faras multajn preparojn por la festo. Sed en la tagoj inter kristnasko kaj novjaro, kiam oni ripozigis do la laborobestojn kaj la laboristaron, alvenis komercistoj kun greno, faruno kaj brando, kaj por tiuj komercaĵoj la mono elspeziĝis. Oni prokrastis ĝis iom da tagoj antaŭ la festo signigi la trabegaron, ĉar ju pli da arbtrunkoj oni povis elveturigi, des pli da mono oni ricevos.

Ĉiu signigisto laboris tiom, kiom li kapablis, tiel ankaŭ mi. Mia frato estis ĉe la loĝejo kaj zorgis pri la tiea okupado, kaj mi ĉirkaŭveturadis en la arbaroj, ĉe riveroj kaj lagoj. Fine do mia laboro estis finita, sed tiam la antaŭvespero de kristnasko jam estis. Veturinta dum la tuta nokto antaŭa, mi alvenis en mian loĝejon nur en la mateno.

„Ne sukcesis,“ mia frato ekdiris, kiam mi envenis, kaj bone mi komprenis, kion li aludis. Ne sukcesis veni hejmen por la kristnasko, ĉar dekok mejloj estus nia vojaĝo, kaj tiu ĉi vojo postulus preskaŭ tri tagojn. „Jes,“ diris li, „mi komprenis, ke ne sukcesos, kaj tion mi skribis al la patrino, tiel ke ŝi ne atendas.“

„Nu, ĉu la kolegoj deveturis?“

„Jes, ĉiuj escepte P. Lin mi invitis ĉe nin, kaj kun Sara (nia mastrumantino) mi parolis, tiel ke ni aranĝu laŭ la sama maniero, kiel ni kutimas hejme: fiŝo, kaĉo kaj Sten Mattson.“

Ĉio tio ĉi estis ja, rilate al la moro de tiu ĉi regiono, bone bonege, sed centoble pli volonte mi dezirus ensalti en la neĝveturilon kaj veturi al la kara hejmo. Neniel utilis tamen pensi pri tio ĉi. La laboristaro devis en la interaj tagoj ricevisian monon, kaj grandegan multon da laboro mi devis fari, antaŭ ol la sumetoj estos trakalkulitaj. Tio ĉi signifis kalkuladi kaj rekalkuladi, tion ni ambaŭ sciis, sed la antaŭvesperon kaj la tagon de kristnasko ni prenis liberajn.

Apenaŭ mi elpakis miajn uzilojn, lavis min kaj revestigis, antaŭ ol Sara malfermetis la pordon kaj diris, ke nun la knaboj povas veni malsupren por trempi en la kuiropoton. La knaboj! Ho, Dio mia, kiel ĝi sonis hejme! Sara estis vidinta nin kreskadi, estis hejme ĉe nia patrino kaj patro, antaŭ ol ni naskiĝis, kaj por ŝi ni restis ankoraŭ la knaboj, malgraŭ ke ni ambaŭ pasis la jarojn de milita ekzerco. Kiom da ĝojo unu sola vorto povas iafoje kaŭzi!

Jes, ni estis pretaj, sed petis ke ŝi paciencu iom da momentoj, ĉar ni atendas gaston, unu alian bedaŭrindulon, kiu ne povis foriri al sia familio.

„Mi scias,“ diris ŝi, „kaj li jam alvenas.“

Sonoriletoj kaj ĉevala paŝado sonis ekstere, kaj jen ni aŭdis, kiel la atendato rapidegis laŭ la ligna ŝtuparo per paŝoj, kiuj resonadis tra la tuta domo.

„Bonan kristnaskon!“ li ekkriis kaj enigis tra la pordo sian vizaĝon, ruĝan pro la vintra frostoj.

„Bonan kristnaskon, tuj eniru! Estu bonveninta!“

„Jes, dankon pro la invito, kaj dankon pro la veturigo! Ĝi iris rapide tiun ĉi pecon da vojo. Tiu ĉi furiozulo Niger kuris, tiel ke mi havis sufiĉan penon por tenadi la okulojn malfermaj kontraŭ la nordvento. Bonan tagon, mastrineto,“ diris li al Sara; „jen ŝi ricevas kristnaskan gaston, ĉar al mia hejmo mi do tute ne forvojaĝos, pri tio ŝi estu certigita.“

„Ne! Kompreneble la sinjoroj bezonas kuniĝi ĉiuj dum la festo, bedaŭrinduloj, tiel malproksime de siaj familioj. Sed nun venu! Se mi staras tie ĉi pli longe, estingiĝos la fajro en la kameno.“

En la kuirejon ŝi kondukis nin laŭ malnova sveda kutimo, ĉar en tiu tempo, kaj multloke do ankoraŭ nun, oni prenis la tagmanĝon en la antaŭtago de kristnasko ne ĉe sida tablo, sed ĉiu servis sin mem je tio, kion li deziris el la kristnaska manĝo. Tiu ĉi konsistas el kuirita viando, ŝinko, kolbaso kune kun aliaj bonaj raritatoj, almetitaj sur la kuireja tablo, kaj sur alia tablo amasoj da kristnaskaj bulkegoj kaj molaj panoj. De tiuj ĉi oni tranĉas grandajn tavolojn, kaj trempas en la kaserolegojn, restantajn sur la kameno, plenajn de grasa viando kaj saŭcaĵo de lardo.

Dum tiu ĉi gravega kaj agrabla okupado oni estas ofte interrompata per puŝeto sur la dorso, kaj kiam oni sin turnas, iu staras tie kun brilante ĝoja vizaĝo, altenante la kruĉon plenigitan per kristnaska biero ŝaŭmanta, dirante: „Sten Mattson!“ Tiam komencas la ordinara ludo kun demandoj kaj respondoj, post kio oni trinkas longajn buŝplenojn, aŭ, kiel ĝi ankaŭ estas nomata, „faras sian devon.“

Kaj certe nia gasto elvidis feliĉa, kiam li rigardis la kristnaskan bieron: ĝi estis

ĝojiga surprizo. Ankaŭ, ni ne forgesis nian bieron dum la trempado, kaj opiniis, ke ĉio ne estis tiel dezerteca, kiel ni antaŭe imagis al ni, ke estos la kristnaska festo tie supre en la valo.

„Nun ni faru al ni kristnaskan abion,“ mia frato proponis, kaj, jen, ĉiu portanta sian hakilon, ni tuj kondukis nian iron al la plej proksima arbareto por trovi unu tielan. Baldaŭ ni havis ĉiu sian abion, kaj kun tiuj ni treniĝis hejmen, kie ili estis starigitaj en la neĝo por pririgardado kaj elekto de la plej bela. Tiu ĉi estis enportita kaj ekhavis piedaĵon, kaj poste ĝi devis esti ornamigita; kaj ni ĉiuj devis ricevi kristnaskajn donacojn. Fariĝis granda serĉado por trovi kolorajn paperetojn, kaj post tio kandelojn. Kandelojn por la kristnaska abio! Sed kie trovi tielajn? Jen tuta nia entrepreno preskaŭ ekperei!

Sara sciis tamen rimedon: ŝi alportis unu malnovan vaksvindaĵon. Ĝojego! Pomoj? Ha, pomoj ne troviĝis ĉe tia jar-tempo tie malproksime supre en Elfdalen. Nur en la aŭtuno ia kaj alia foira pomo povis erari sin ĝis tien, ĉar tio, kion la dalbyano en ĉiutaga parolo nomas pomo, estas tute simple terpomo. Tiajn ni ne povis ja pendigi en la kristnaskan abion. Kial ne! Ni havis ja flavan paperon. Se ni volvus ĝin ĉirkaŭ la terpomojn, ili bonege servus kiel pomoj, beligus grande la abion. Kaj tiel ili ankaŭ efektive faris. Kiom ni streĉis nian kapablon de eltrovado, ni sukcesis aranĝi la abion iel simila al la tiela de nia patra hejmo, kaj la kontenteco estis granda, kiam tiu ĉi malfacilaĵo estis venkita.

Restis la kristnaskaj donacoj! Ni staris unu momenton senkonsilaj, sed post tio ĉiu disiris. Mia frato kaj mi pririgardis niajn malmultajn apartenaĵojn kaj tro-

vis ion kaj alion. Sed kiamaniere nia gasto sin helpos, ĉar multajn donacojn ni ĉiuj devas ricevi kaj doni?

La problemon li sendube solvis, ĉar ni aŭdis, ke li kraketadis kun papero kaj petis pri ŝnuroj, kaj poste estis aŭdata gratado de la pumo, ĉar ĉiaj donacoj devis havi konvenajn surskribojn, devizojn kaj versojn.

Ĉiuj paketoj estis kolektitaj en unu korbo, kiu staris en la vestiblo, kaj kiam mi enmetis la miajn, la korbo estis jam preskaŭ plena. Kion ĝi povas do enhavi? „Preta!“ diris mia frato, „mankroĉu, kaj ni portu la korbon malsupren en la manĝoĉambro (malgranda ĉambro apud la kuirrejo), tie ni havas la abion.“

„Ĉu vi havas tiom da kristnaskaj donacoj kaj tiel grandaj?“ demandis Sara, kunfrapante siajn manojn. „Neniam mi imagis ion similan tie ĉi en la arbaro.“

„Jes, nun vi vidos,“ diris ni, tre vivigitaj. „Eklumigu nun ĉiujn kandelojn kaj alportu la bierokruĉon.“ Tiun ĉi ni ricevis kaj krom tio pladon da buterobakajoj. Hura'! Sten Mattson!

(Fino venos.)

Adresaro de niaj abonantoj.

(Daŭrigo.)

Belgujo :

282. Venceslas Woyde, en Bruxelles, 10, rue des Plantes.

Francujo :

284. J. Charvin, juge de paix, en Taninges (Haute Savoie).

Germanujo :

279. Prof. Dr. Ad. Schmidt, en Gotha, Herrenwiesenweg 3.

Italujo :

278. Clarence Bicknell, en Bordighera.

Rusujo :

265. A. D. Dobrosmislov, svjaščennik s. Kajbiĉeva, en St. Bolšie-Berezniki, Simbirskoj gub.

266. V. Vinnicki, en S. Peterburgo, Mojka, dom n-ro 40, kontrol Sborov Rjazansko-Uralskoj ŝel. dor.

267. V. Kurmanajev, en S. Peterburgo, Krjukov kanal, dom n-ro 27, loĝ. 6.

268. I. Moskovĉenko, en St. Raĥni-Lesovje, gub. Podolskaja, Kontoro de Ŝpikovskoe bieno.

269. F. Ivanov, en Voroneĵ, Granda Aleksejevskaja strato, dom n-ro 10.

270. A. Fedorov, en Kostroma, Pravlenie Novoj Kostromskoj Lnjanoj Manufactory.

271. A. Zakrĵevski, en Arĥangelsk, Troickij procp. dom de s-rino Popova.

272. I. Semizorov, en Astraĥan, Sjezd Miroviĥ Sudej.

274. S-rino K. Moŝumanskaja, en Ŝostka, de gub. Ĉernigov.

275. S. Demĉenko, en Ŝostka, de gub. Ĉern.

276. K. K. Gejns, en Ekaterinodar.

277. A. Kofman, en Odessa, Neĵinskaja 34.

280. Fraŭlino Ĵenni Nudelmann, en Priluka, st. Turbov, Kievskoj gub.

281. I. Kaminskij, Bolŝaja Peterburgskaja, dom Pressmanna, en Ĵitomir.

283. Dr. A. L. Veitzler, en St. Koupjansk-Ouzlovoï, Kharkov-Balachov ŝel. dor.

Svedujo :

77—78. D-ro V. Peterson, lektoro, en Karlskrona, V. Amiralitetsgatan 8 (abonis ankoraŭ unu, entute 3 ekz., la trian sub N° 264).



Informejo

de esperantistoj.

Nian gazeton oni povas aboni en Rusujo ĉe s-ro Aleksandro Zakrjevski, agento de la lingvo Esperanto, en Arĥangelsk (Filio de la Societo „Espero“); — kaj ĉe s-ro V. Rogaĉev-Antonov, en S. Peterburgo, Kazanskaja 26, loĝ. 52.

*

Deziras korespondadi per poŝtkartoj ilustritaj s-ro Ivan ŝirjaev (adreson vidu sur la paĝo 29, 1-a kolono, abonanto N^o 166). — Respondas ĉiun leteron de esperantistoj.

*

Deziras korespondadi kun esperantistinoj kaj esperantistoj per ilustritaj poŝtkartoj s-ro Theodor Sunell, en Kanus, Finlando.

*

Korespondadi en Esperanto deziras s-ro Aleksandro Zakrjevski, en Arĥangelsk, Rusujo.



Rebusoj.

De Paul de Lengyel.

I.

TRE	ZA	er er er er er er er
PRI		er er er er er er er
		er er er er er er er

II.

- tero
 - kalo
 - lumo
 - legio
 - esti
 - resti
 - ajlo
 - rompi
 - ke
- Antaŭ tiujn ĉi vortojn oni metu literojn por fari aliajn vortojn el ili, — tiel, ke la almetotaj literoj (legate de supre al malsupre) donu tre konatan vorton antaŭ ĉiu esperantisto.

III. (Ŝerco.)

ĝuo, honora, rulo. Arangŭ la literojn de tiuj ĉi vortoj en tri aliajn vortojn. Ĉiu solvanto de tio ĉi ricevas unu oran horloĝon.

La solvojn de tiuj ĉi rebusoj ni presos en la junia numero. — Ni petas tiujn inter la legantoj, kiuj sin interesas pri tio, ke ili alsendu la solvojn al la **administrado** de nia gazeto. La nomojn de la solvintoj ni presos kune kun la solvoj mem.

Oni povas ensendi ankoraŭ la solvojn de la rebusoj enpresitaj en la n-roj 1 kaj 2.

La amplekso de tiu ĉi numero estas 20 p.

ANONCOJ.

Tiuj estimataj esperantistoj, kiuj intencas varbi abonantojn por nia gazeto, volu kompleze sciigi pri tio ĉi la administradon, kiu volonte sendos al ili kelkajn ekzemplerojn de la L. I.

Ĉe la KLUBO ESPERANTISTA en UPSALA estas aĉeteblaj:

Jarlibro Esperantista 1897, eldonita de la Societo „Espero“ en S. Peterburgo. Kostas 1 frankon.

Libro de l' Humorajo de Paŭlo de Lengyel. Tre rekomendinda verko, precipe uzebla kiel ekzerca lego de komencantoj. Kosto 3 fr.

Restantaj jarkolektoj de „Lingvo Internacia“ 1899 (malgranda nombro) estas riceveblaj ĉe mi. Kosto: svedaj kronoj 1.50 == francoj 2.—

Hjalm. Bäckström

Örnsköldsvik (Suède).

Finlandaj Esperantistoj, kiuj intencas akiri amatorajn fotografajn aparatojn, estas petataj observi, ke tiaj, kune kun necesaj ĥemiaĵoj kaj uziloj, estas akireblaj ĉe ni je moderaĵaj prezoj, krom kio al esperantistoj estas permesata rabato da 5%. — Postulu kostotabelojn!

Jyväskylä Rohdoskauppa
en JYVÄSKYLÄ.

☞ JUNA HOMO ☞

(22 jaroj), polo, deziras korespondadi kun ia esperantistino, en celo konatiĝi kun ŝi kaj edziniĝi; plena garantio de silentado; seriozajn ofertojn esperantistinoj povos sendadi laŭ la sekvanta adreso:

Arĥangelsk (Russie), al sinjoro
A. Zakrĵevski, por sinjoro * *

SARĜADO KAJ VENDADO DE ŜIPOJ.

La Rochelle kaj La Pallice (Francujo)

SAMUEL MEYER

ŝipa makleristo

Tradukisto ĵurinta por angla, germana, holandana, sveda, norvega, dana, itala, hispana kaj portugala lingvoj.

TELEGRAFA ADRESO: SAM LAROCHELLE.

Francaj vinoj kaj brandoj.

ALBERT VINCENS

BORDEAUX
rue Poitevin, N° 10.

Oni bezonas privatan instruistaron francan kaj germanan. Sin turni al la Filio de Societo „ESPERO“ en Arĥangelsk (Russie), Troickij pr. domo de s-rino Popova.

===== PRESEJO ESPERANTISTA. =====

PAUL DE LENGYEL, SZEGZÁRD (HUNGARUJO). — ENTREPRENAS LA FARADON DE ĈIUSPECAJ PRESAĴOJ.

BONA LABORO.

MODERAĴAJ PREZOJ.

Esperantistoj!

Disvastigante la konadon pri Esperanto oni akcelas la tutan aferon Esperantan. Unu maniero estas uzi ĉiam propagandajn kovertojn. Tiaj en sveda lingvo estas riceveblaj en Svedujo ĉe la Klubo Esperantista Upsala, — en Finnlando ĉe s-ro Aug. Th. Laurén en Jyväskylä, kaj kostas nur kr. 1 (Fmk. 1:40 p.) po 100, al kio sin almetas la poŝtopago.

Ni petas niajn abonantojn ankoraŭ nepagintajn, ili volu havi la bonecon, ensendi kiel eble plej baldaŭ la tutjaran abonmonon al la administrado de nia gazeto.

El la presejo de Paul de Lengyel en Szegzárd, Hungarujo.